Pensez donc ! Intégrer les jeunes artisans dans le processus européen !

Mais cette promesse de campagne ne pouvait se réaliser qu'à condition d'introduire l'espéranto, seule langue accessible dans un temps limité, dans les centres d'apprentissage : deux ans d'espéranto, par exemple, comme le suggère l'Unesco.

Les candidats consultés à ce sujet ont su se dérober alertement ! Et le remue-méninges de ces trois mois dans notre pays a pris fin.



L'intégration citoyenne en Europe n'a guère intéressé les présidentiables, ni les électeurs.

Cependant ... la promesse évoquée a été un encouragement pour contacter deux jeunes apprentis dans ma rue. Leur méconnaissance de langues étrangères verrouille sans appel leurs échanges directs dans d'autres pays : une frustration d'autant plus vexatoire qu'elle s'annonce définitive.

Aujourd'hui, après dix séances d'étude de l'espéranto, ces deux jeunes découvrent leur capacité d'accès à une langue et les possibilités de contacts sur Internet. L'été prochain, ils envisagent de participer à une rencontre dans un pays de l'UE, une semaine en camping avec de jeunes européens. (Preĝu mi por ke ...)

A. Hubert

Bonjour, Voisin !

Parmi nos soucis d'espérantiste, s'inscrit la devise "Mieux se comprendre" (Déclar. univers. Art 26 § 2).

Pour l'année d'étude que nous entamons, se pose la question: «Que pouvons-nous faire pour aller davantage vers les autres?» Dans l'Union européenne, d'abord.

Nous proposerons un après-midi de découverte d'un pays de l'UE, au cours de notre 'Konversacia rondo', fin de trimestre. Le projet s'appelle: "Bonjour, Voisin!" Et la première proposition concernera la Finlande.

L'office de tourisme finlandais à Paris nous fournira quelques documents écrits; des amis finlandais complèteront notre attente, en littérature et chansons. En finlandais, bonjour se dit : HYVÄÄ PÄIVÄÄ.

Pour l'année à venir, sont prévues des approches de la Slovénie et de la Hongrie: nous pourrions compter sur de l'aide.

Ni invitos eksterklubanojn.

SPEYER en Esperantio

Impresas la romanika katedralo de Speyer.


Ja estas konstruaĵo de imperiestroj, kiam tiuj regis Germanion kaj Italion samtempe.

Ĝia alteco, luma navego kaj harmoniaj dimensioj invitas al meditado. Unuflanke la eno tiras ĉielen, aliflanke la ekstera vido ampleksas firmecan, imperian aspekton.

Vizitante tian imponan sakrejon, ajna turisto spertas eksterordinaran etoson, sentas senliman admiron por la tiama konstruado kaj la homa postulo superi siajn limigojn.

Dimanĉon, la 24-an de junio, veturis al Speyer kvar klubanoj. Celo estis ĉeesto en esperantlingva meso kaj vizito de la urbo.

Anton Kiefer, en Edenkoben, amike akceptis nin en sia vinlaborejo kie ni manĝetis kaj gustumis produktaĵojn el lia kelo. Poste okazis kunveno kun la tieaj samideanoj en babilema rondo.



TRI HAJKOJ
por ia ekflugo. (el @)



Heĝon laŭiru
plaĉodoras la rozoj -
Rideton kaptu

Dietlinde Heider

Vivokron' via
de rozo kaj de kardo
flore plektatas

Dietlinde Heider

Ventet' forblovas
grandajn pripensojn, pfut! -
nur stretaj postrestas

Jacques Bussy

92-a UK en Jokohamo aŭgusto 2007



Jokohamo estas tre moderna haven-urbo kun multe da trafikeblecoj. En Pacifiko-Jokohamo, en 4a kaj 5a etaĝoj troviĝis la ĉefa kongresejo. En alia proksima konstruaĵo, Minatomirai estis la tre oportuna halo por la solenaĵoj, kiu povis akcepti ĉiujn kongresanojn. Dum la malfermo anstataŭ nur muzika paŭzo ankaŭ junaj kaj viglaj dancistoj gajigis la etoson en tre agrabla kaj spontana maniero.



La nacia vespero

Ankaŭ ĝi okazis en tiu sama halo. 4 prezentaĵoj estis proponitaj. Antikva japana muziko *Gagoku*, kotoo-muziko, japana solo danco *Nihonbujoo* kaj la lasta estis la plej vigla. 30 studentoj ludis gajan kaj festan muzikaĵon per japana tamburado. Ilia tamburado estis kvazaŭ samtempa vigla dancado. Ili plene sukcesis kaptis la atenton de entuziasmigita publiko:



Kie troviĝas la Muzika halo? Jen simpatia maniero indiki al la kongresanoj la vojon al tiu halo por la koncertoj kaj la teatraĵo. Ili efektive okazis en Miyamoto iomete for de la ĉefa kongresejo. La teatraĵo Galileo estis prezentita de profesia aktoro Saša Pilipović. Per ĝi li sukcesis fari paralelon inter la vivo de Galileo, miskomprenita kaj misfamigita de tiama eklezio kaj kun la nuna situacio de Esperanto. Tre agrabla kaj bonega prezentado.



Dum la tuta semajno la programo estis tre varia kaj abunda. La kongresa temo estis: "Okcidento kaj Oriento akcepto kaj rezisto. Refoje estis tre ŝatata la kleriga lundo kun variaj temoj proponitaj. Krome okazis kursoj pri diversaj japanaj tradiciaj kulturoj: Te-ceremonio, floraranĝo *Ikebana*, ŝamiseno (trikorda muzikilo), kaligrafio, Sorobano (japaneksa kalkulilo), surmetado de Kimono. Fine dum la kongreso estis elektita la nova prezidanto de UEA: Probal DAŠGUPTO el Hinda Unio.



... sur la spuroj de la malnovaj uzintoj de la "silka vojo"...

- unua etapo -

Stranga itinero, kiu ligas Parizo al Moskvo... tra Romo ! Nu, kiam oni deziras admiri la Alpoj tra luko de aviadilo, tio iĝas normala ! Ni fakte atingos la aluditan ĉefurbon kun deko da bildoj en la fotilo...



Miraklo de esperanto... Dank' al zorge ellaborita vojaĝplano, bonvenigas nin ĉe la flughaveno *Sheremetyevo 2* nia futura ĉiĉerono *Mikaelo (Mihail Ĉertilov)*, kiu tre baldaŭ ricevos la titolon de "magiisto".

Tuja malkovro de la luksaj haltejoj de la moskva metroo kaj de la lokaj busoj por atingi nian unuan tranoktejon, kiun disponigas la *Moskva Esperanto-Centro* al siaj gastoj. Kvietaj, kompleta ripozejo tamen iom tro malproksima de la urbocentro... Nu, Mikaelo, vere helpeme, malkovras simplan hotelon pli adekvatan ; malfacila tasko, kiun li plenumos rapide spite al la svarmo da turistoj, kiuj tiuepoke jam okupas la lokojn.

Vere bonega ideo elekti krozadon sur la *Moskva*, kiu ebligas malkovri alimaniere vidindaĵojn de la urbo. Ambaŭflanke de la riverego, imponaj konstruaĵoj sovetstilaj najbaras je

modernaj fasadoj. Neatendite: iom post iom verdiĝas la dekstra rando, sur kies gazonejoj bruniĝas duonnudaj korpoj !

Dimanĉe, impresa vizito de la *Borodino-panoramo-muzeo*, kun giganta pentraĵo cirkloforma, 115 metrojn longa kaj 15 metrojn alta, kiu elvokas "reliefe" batalon inter la armeo de Napoleono kaj tiu de Kutuzoj en 1812.



Samtage posttagmeze, sub "tropika" varmego (ni alkitimiĝos dum trin semajnoj !), promonado en la *Parko de la Venko*, kie staras simboliga obelisko 142 metrojn alta...



La morgaŭon, neevitebla unua supra okulumo al kaj tra la *ŝtata fortreso* kun ĝiaj imponaj monumentoj. Ni, solaj, revenos kaj piedumos sur la *Ruĝa Placo* sen mistrafi viziton de la ankaŭ fama *Gum-galerio*, kie riĉuoj de la urbo povas akiri parizaĵojn en luksaj butikoj !... Merkrede ni senlime frandos dum horoj la *galerion Tretiakov* ... 130 000 verkoj, inter kiuj unikaĵo, riĉa ikon-kolekto.

Post tiu memorinda vizito, Mikaelo akompanos nin vespere por piedumi longe de la ankaŭ fama *Arbat-strato* ... Ĉu ni menciu la specifan recepton de la rusa supo proponita en tiea tipa restoracio ?


Ĉu forlasi Moskvon sen vizito de la ankaŭ fama *muzeo Puŝkin*, kun pli ol unu miliono da verkaĵoj prezentitaj... Ĝin ni aprezi, akompanataj de *Nina*, nia ankaŭ helpema dua gvidintino. Ni *ruse* finos tiun plenplenan tagon por ĝui belajn melodiojn de juna kantisto. Strange: ambaŭflanke, piede de la podio, du policistoj tute senmovaj dum la tuta evento...



Ni plue aludu malkovron de la *muzeo pri armiloj kaj juveloj* el la tsar-epokoj, misviziton -por mi !- de la freŝkonstruita katedralo *Christ-St-Sauveur*... Mankis ja dek centrimetroj je la malsupra parto de mia pantalono... do, maldeca vestaĵo ! Feliĉe mi povis senprobleme eniri la certgrade proksiman bazilikon *Basile-le-Bienheureux*, kiu kvazaŭ simbolas la ĉefurbon sur ĉiuj bildkartoj !

Nepre trairinda, *Ĝardeno Alexandre* kun ĝiaj refreŝigantaj fontanoj !...

Sed nun, ek al la flughaveno per la iom malobeema aŭtomobilo de *Juri*, ankaŭ



amike dungita de Mikaelo !

Flugo al *Krasnodar*, elirpunkto de nia dua etapo ĉe la *Azova maro* por enpartopreni *RET-07*. Nova miraklo de alia "magiisto": *Ira* atendos nin por veturigo ĝis la bus-haltejo...

... Ĉu vi deziras travivi kun ni ripoz-semajnon en la somerumejo *Lotuso* ?



Rezigninte pri partopreno en la UK en Jokohamo, ni elektis alian "ekzotikan" aranĝon, kiun ni malkovris post trarigardo de la jara *kalendaro*. Ni do flugu al *Krasnodaro* kaj poste per buso al *Primorsko-Aĥtarsk* !...



seminario kun niaj "francaj gastoj"

maro, varma, glata, kiel spegulo... kaj ankaŭ neprofunda! Necesas ja piedmarŝadi du aŭ tri hektometrojn por ĝui refreŝigan naĝadon! Spektaklo plua, tiu de la ĉiutaga sunsubiro ĉe la horizonto, kiu logis grandan parton de la gastoj, taŭga momento por interbabilado ĉiutema.

Fakte, malfacilis elekti "travivaĵon" en la programo ellaborita de la skipo, kies membroj meritas ĉiuj komplimentojn. Prelegoj divers-specaj sin sekvis, sed ankaŭ svarmis momentoj por ĝui kunestadon antaŭ trinkaĵo, ne nur dumtage sed ankaŭ vespere en la gufuĵo, kiu



neniam malpleniĝis.

Nia delegitaro (?) emocie aprezis pianoludon de *Irina*, dediĉita al "niaj francaj amikoj". Ankaŭ ero neatendita en iu tag-programo, titolita *seminario kun niaj francaj gastoj*. Temis fakte pri intervjuo, kiu foje entenis pintajn demandojn... "*Kiamaniere vi voĉdonis por elekti vian ŝtatestron?*"

Cetere, renkonto kun ruso, kiu maratonis en Francio, kun ruso loĝanta en Omsk, kiu gastigis *Zef* dum lia fama biciklumado tra Eŭropo kaj Siberio, elvoko de viv-sekvencoj kun maljuna ina gasto, kiu vendis sian ĝardenon por ricevi necesan sumon por enpartopreni, kvankam tiu kosto tute ne aspektis alta por ni, francoj... Ŝi deziris denove "praktiki"

iom da franca idiomo, kiun ŝi lernis antaŭ longe.

Ni citu el la malstreĉigaj travivitaj horoj, eksplodigan koncerton de *JoMo*, kiu ekflamigis la tutan salonon, la prezentaĵojn de *Mikaelo Bronŝtejn*, foje akompanataj de kunludantoj. Ni ne forgesu la mirigan kaj mirindan interpretadon de juna violonisto, nur 12 jaraĝa! Memevidente teatraĵetoj humurplenaj estis aplaŭditaj ĉiuvespere. Ĉu ne aparte aludi la "profesian deĵoron" de Garik por la aŭkcia evento? Jen okazo por gratuli lin, kiu iĝis ĉiam disponebla kiam bezonate, kaj kiu solvis rapide ĉiujn problemetojn.



Tradicia ekskurso ebligis alveturi alian mar-randon, kie avida naĝis

volontuloj, post ŝatita ŝoviĝo tra florumantaj lotus-kampoj per motorboato, kiu foje tre *sportumis* laŭ la liberaj aleoj de ia ĝangalo, kie kreskas abunde altaj kanoj!

Ni estu ankaŭ dankemaj al la faka skipo, kiu preparis la ĉiutagajn manĝaĵojn... Hem!... Mi humile konfesas, ke kelkaj eroj iĝis por mi tro *rusaj*!?!...

RET-07, jen somer-evento, kiu tutcerte riĉigos ne nur nian foto- sed ankaŭ nian viv-albumon!

... Jes! Lotusfloro sur la Azov Maro ! ...

Azova Maro... La nura elprononco de tiu nomo jam ekscitis nin! Kaj ni fariĝis eta -sed kvalita!- franca delegitaro, kiu komence kvazaŭ "dronis" en la ampleksa, rusa partoprenantaro! Nu, same rolis la usona grupo! Ni statistikumu: 183 personoj el 45 loĝlokoj de 8 landoj...

Trankvila kaj komforta loĝejo en domego, en neatendita verda parko spite al la pli ol rara pluvofalo!

Plej vasta, kultur-riĉa kaj eklektika programo dum la tuta semajno, aprezinda en vere amika etoso... Nur esperanto-eventoj kapablas oferti tion! Notinde: neniel krokodilado... jen ekzemplo sekvinda aliloke...

Jam je la unua tago, unua surprizo... malkovro de vere specifa ... saluton, Maja ! ...



Imagu, ke alia aventuro atendas nin, poste, en Uzbekio. Pri ĝi, raporto kuŝos en la venonta bulteno (N°140) Ĝis tre baldaŭ!



Mi partoprenis en la 59-a kongreso de **IFEF**, *Internacia Fervojista Esperanto-Federacio*, kiu okazis en Parizo de la 12a ĝis la 19a de majo 2007, en la internacia restadejo « CISP Ravel », kun 271 kongresantoj el pli ol 20 landoj, el la tuta Eŭropo kaj el Ĉinio. Mi ĝuis tre bonan etoson kaj tre diversan kaj kulturen programon !!!

Dum la malfermo de la kongreso diversaj respondeculoj alparolis la kongresanojn. *Sylviane Lafargue* prezidantino de Franca Fervojista Esperanto Asocio kaj de la OKK bonvenigis la kongresanojn. La sekretario de la centra entreprena komitato (Comité Central d'Entreprise) de SNCF, *Sylvain Brière*, longe parolis, apogante la agadon de la fervojistaj esperantistoj por la interkompreniĝo inter la popoloj kaj la paco. Li aŭskultis atenteme la aliajn parolantojn pere de la tradukintoj. Mi ĝojis, ke tiu homo de mia fervojista sindikato ĉeestis kaj aŭdis pri nia afero !!! Sekve la paroloj de *Sylvain Brière*, kiun pledis por la fervoja publika servo, *Renato Corsetti*, prezidanto de UEA, kritikis la privatigojn de la fervojoj, kiu minacas la publikan servon, la fidindecon kaj sekurecon de la fervojaj trafikoj. Li rakontis pri nefindindaj kaj malfruigintaj trajnoj de privataj kompanioj en Nederlando. La reprezentantino, *Rosalinde Taucher*, terminaristino, ĉe Internacia Fervoja Unio *Union Internationale des Chemins de fer UIC* substrekiis la gravan laboron de la IFEF komisiono pri la fervoja esperanta terminologio, kiu staras sine de UIC. Ĉeestis personoj, kiuj salutis la kongreson: nepo de Zamenhof, *Krešimir Barkovic*, ĝenerala sekretario de SAT, *Romano Bolognesi* prezidanto de IFEF. *Hubert Peyrouy* kaj *Laurent Vignault* tradukis la salutojn. *José Lafosse* prezentis ĉiutage la kulturen programon.

La ekskursiva programo estis tre diversaj: *Versailles*, *Montmartre*, ŝippromenado sur la kanalo *Saint Martin*, la laboratorio por provi kaj testi la fervojan trakveturilaron *Laboratoire d'essais ferroviaire SNCF de Vitry sur Seine*.

Jomo koncertis senĉese en pluraj lingvoj dum du horoj kaj varmigis la kongresan salonon. *Bruno Robineau* prelegis pri pilmigrado al *Saint-Jean de Compostelle* kun diaporamo. Aŭvernja grupo pri popola danco dancis la « bourée ». Ankaŭ dancis sur la scenejo kreolaj gedanciistoj. Kreolaj muzikistoj fervojistoj animis la internacian balon. Oni bone manĝis en la bankedo.

Per multaj prelegetoj kongresanoj prezentis diversajn fervojajn modernajn teknikojn: *ERMTS* esperanto de fervoja signalizado, historio pri la trajnrapiĉeco, fervoja linio de Brest al Quimper, nova sistemo por vendi la trajnbileton per speciala kreditkarto en Danio, protektado kontraŭ la korodoj de ŝtalpontoj, italaj vagonaroj, modernigo de la energiprovizoj, elektra trakkirĉvito, konstruontaj tuneloj trans la balkana montaro, ktp...

Laborkunveno kaj ĝenerala kunveno de IFEF okazis pri la bilanco kaj projektoj de nia asocio. Kunvenojn oni aranĝis por interkonsenti pri kiuj taŭgaj novaj vortoj la terminara komisiono enkondukiĝos en la fervojan terminaron de UIC. La komisiono de IFEF partoprenas en la laboro pri *RailLexic*, kiu temas pri tradukado al plej multaj lingvoj de pli ol 16 000 (!!!) terminoj de la internacia fervoja terminaro de UIC. Notinde estas, ke la Esperanto-parto enestas inter ĉirkaŭ 20 aliaj lingvoj kaj troviĝas inter la plej kompletaj, ĉar la tutan jaron prilaboras ĝin diverslandaj fakuloj, perkoresponde aŭ dum kunvenoj, dum aŭ ekster la jara kongreso de IFEF. UIC eldonis paperan fervojajn terminarojn de Esperanto al 20 lingvoj, eĉ eldonis komputilan version, kiun UIC regule reaktualigas. Ankaŭ nia komisiono partoprenis por PIV pri fakaj fervojaj difinoj.

Ankaŭ mi akceptis kongresanojn en unu *CISP Kellerman* el la tri restadejoj por la kongresanoj. Tio ebligis al mi havi bonajn kontaktojn kun geesperantistoj el Ĉinio, Kroatio, Rumanio, Ĉekio kaj Bulgario.

Mi vizitis Parizon kun bulgara fervojisto, *Pavlin*, faka inĝeniero pri trakoj, li tre admiris nian ĉefurbon kaj la tute novan fulmrapidan trajnon *TGV-Est*, kies elektra motortrakci-ilo bele ornamita kiu ĵus gajnis la mondan rekordon de rapideco, 574,8 km/h, la 3an de aprilo 2007, ŝipveturis malrapide sur la Sejno !!!

La OKK zorgeme preparis tre bonan kaj enhavoriĉan kongresan programon kaj elektis tre bonan kongresejon kaj restadejon. Ili meritas multe da gratuloj !

Bruno HENRY, fervojisto, Riparejo de ŝargvagonoj en Thionville (57)

... "c'était hier" ...

Il y a vingt ans, inauguration de "l'Espace ESPERANTO" à Montigny-lès-Metz

25^a staĝo de parolata esperanto "Ermitage" MOULINS lès METZ

7an/8an de novembro 1987



Ermitage St-Jean,
Rue du Château,

F-57160 MOULINS-lès-METZ

Bonvenon al nia 25a staĝo de "Parolata Esperanto"!

Ni kore invitas ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni en MOULINS-lès-METZ por praktiki la internacian lingvon en AMIKA kaj STIMULA etoso!

Estas antaŭviditaj 5 kurs-gradoj:

Kurse A1	por tuj komencantoj	Kurso C	la partoprenantoj fajne poluros siajn konojn
A2	por ĵus komencintoj...		
B	por tiuj, kiuj finis la-gradan kurson	Kurso D	Elstara prelego kaj diskut-rondo! Animos André CHERPILLOD el PARIZO.

Temo de la kurso D: La internacieco de la gramatikaj vortoj en Esperanto. Kio estas la aglutinaj lingvoj, kaj ĝis kia grado Esperanto estas aglutina? Kiu estis Ĵana d'Arko kaj kiel ŝi mortis?

GVIDANTOJ: kurso A1: Sr^o GUILLALME, A2: Sr^o COLNOT, B: Sr^o GREINER, C: Sr^o GROSSMANN

PROGRAMO

- Sabaton, 7an de novembro - Ĝis 14h45: Akcepto de la staĝanoj. 14h45/18h30: kursoj (kun paŭzoj!) 18h30: libro-servo. 19h30: vespermanĝo. 20h30: ELSTARA DIAPORANO pri TRA LA VIVO DE NIA FEDERACIO. Komentos Jean-Paul Colnot.

- Dimanĉon, 8an de novembro -

... ĝis la 8a : matenmanĝo. 8h15/9h : kurso. 9h15 : forveturo (eventuale) al la preĝejo St-Joseph en MONTIGNY-lès-METZ : dulingva, alta Meso. Partoprenos ĥoro kaj urba muzikantaro. Post la meso : en parko de la " Salle EUROPA "... eta koncerto de la muzikantaro (kun " La Espero ").

Inaŭguro de la " Placo de ESPERANTO " fare de la urbestro de MONTIGNY-lès-METZ. Honorvino 12h30 : komuna tagmanĝo.

...ek de la 14h: GVIDATA VIZITO de la Filatela Ekspozicio kun Esperanto-Fako. ("Maison pour Tous" Marc SANGNIER en MONTIGNY-lès-METZ, 8 Allée Marguerite). Gi ankaŭ estos malfermata la Sabaton 7an, posttagmeze; funkcios punkta poŝtoŝtanco. Vendeblos poŝtaj memoraĵoj. Ilin vi povas mendi ek de nun al:

Marthe NAU, 6, Allée Marguerite, F- 57158 MONTIGNY-lès-METZ

- ilustrita koverto "unua tago de la specifa stampo"	8 FF	
bildkarto stampita de la aludita poŝtoŝtanco	10 FF	pagebla anticipe per ĉeko
sendkosto (ne registrite)	3 FF	

KOSTOJ (po persono)
ALIGKOLIZO: 60 FF (+ 40 FF: abono al LA INFORMILO por ne-abonantoj kaj por ne-fedecianoj).
 40 FF por gejunuloj (12/18 j.) senpage sub 12 J.
MANĜOJ: 46 FF (vespermanĝo, sabate). 52 FF (tagmanĝo dimanĉe). trinkaĵo enten.
TRANOKTADO: 42 FF + 15 FF (matenmanĝo). Unu aŭ du-lita ĉambro, varma akvo.



Ĉu ni manĝu japane?

En Japanio eblas trovi tre variajn manĝojn kun plej diversaj fiŝaĵoj kaj maraj frandaĵoj. La akompana garnajo estas ofte rizaĵo aŭ nudeloj. Ni ricevu iom da kla-riĝoj de s-ino Sugitani Hiroko.

Bonan apetiton



Eniro al restoracio

Pri Soba:

Soba, ekzakte "fagopira nudelo", estas unu el la japanaj nudeloj. Ĝi estas farita el fagopira faruno. Oni knedas la farunon kun akvo, platigas, maldikigas plivastigante, tranĉas mallarĝeta kiel fadenon. Kaj oni boligas ĝin. Estas du bazaj kuirmanieroj de Soba: varma kaj malvarma. La unua, "Kakesoba", estas varma nudelo en varma supo. La lastan, "Morisoba", oni manĝas trempante la nudelon en saŭcon. Aliaj estas variaĵoj, ekz. : "Zarusoba" estas

Tiu restoracio proponas malvarmajn pastojn: Soba



Ju pli luksa estas la aldonajoj sur Soba, des pli ĝi estas multekosta. La manĝmaniero de "Zarusoba" estas interesa. Unue por ekzameni la guston de Soba oni manĝas unu aŭ du nudeletojn sen saŭco kaj por konfirmi la nuancon gustumas la saŭcon iometete.

Poste oni enmetas gustigaĵojn en la saŭcon laŭ sia plaĉo. Nun oni manĝas la nudelojn "Soba" uzante "Haŝi" (japana vorto por manĝobastonetoj aŭ haŝioj) per dekstra mano kaj tenante la taseton de la saŭco en alia mano.

Soba estis ŝatata kaj disvastigita de kor-

polaboristoj, kiuj kolektiĝis el ĉiu regiono por konstrui kastelon kaj domegojn pro la fondiĝo de la ŝoguna registaro en Edo (nuna Tokio). Ekde tiam Soba fariĝis popola manĝaĵo. Plian oportunon Soba havas. Fagopiro estas kultivebla eĉ en malvarma klimato kaj en malfekunda tero. En Japanio tiu manĝaĵo estis origine por gratulinda tago, ekz. : Soba ĉe la jarfino kaj Soba por transloĝiĝo.

Ĉiam ĝi plenumas gravan rolon en la nodo de nia vivo. Por tio Soba estas oportuna, ĉar oni povas simple boligi ĝin kaj regali samtempe multe da homoj. Soba estas manĝaĵo intima al ni japanoj de antaŭ longa tempo ĝis hodiaŭ.



Prezentado de diversaj antaŭ-manĝaĵoj

Pri Unadon:

Unadon estas rizaĵo kun angilo, tiu glitiga riverfiŝo, kiu havas multe da graso. Tial kapti kaj kuiri ĝin estas malfacile. Oni metas rostitan angilon sur rizaĵon, kaj verŝas iomete da dolĉa saŭco (japane "Tare"). Kutime oni surŝutas zantoksilon (japane Sanŝoo) sur ĝin. Ĝi estas tre bongusta, kaj estas ŝatata de multaj japanoj. Manĝante Unadon en varmega somerkulmino oni fartas sane.



Site de soutien pour les
les organisateurs de cours et les étudiants autodidactes

professeurs d'Esperanto,

- Katalogo** – liste évolutive de matériel d'enseignement de l'Esperanto, offrant des descriptions détaillées ainsi que des liens aux services de vente par correspondance
- Lerniloteko** – large quantité d'exercices, de matériel d'enseignement et de conseils mis à disposition par un grand nombre d'enseignants
- Monda Mozaiko** – articles intéressants, avec exercices d'exploitation, également disponibles comme messages
- Internaciaj Ekzamenoj** – information et exemples des examens UEA/ILEI
- Legejo** – collection d'articles traitants de méthodique et de pédagogie
- Retligiloj** – liste de liens utiles
- Eduka Servo** – espace permettant de faire des **annonces**, de consulter un **agenda des cours** et de trouver des **professeurs disponibles**
- Koresponda Servo** – possibilité de passer une annonce pour trouver un correspondant
- Esperanto-lernejoj** – liste des lieux publics d'enseignement de l'Esperanto, ainsi que des classes de tous niveaux de par le monde
- Metiejo** – permettant d'échanger expériences, idées et commentaires sur les programmes offerts
- Forumo** – pour les discussions concernant la didactique
- Système de recherche et autres services**

Pour les membres inscrits, il existe la possibilité de se faire tenir au courant des nouveautés dans les registres de leur choix.

www.edukado.net

Pour apprendre l'Esperanto:

www.lernu.net

Plus d'information sur l'Esperanto:

www.esperanto.net

Okaze de la *Universala Kongreso* en Jokohama, [edukado.net](http://www.edukado.net) eldonis paĝon, kiu ankaŭ valoras por ĉiuj aliaj esperanto-renkontiĝoj... Jen ĝi :

Premiero dum UK en Jokohamo
" *Pinĉilumu* " - kun [edukado.net](http://www.edukado.net) ! ...



La porinstruista paĝaro "www.edukado.net" lanĉas novan rilat-ludon por helpi en tio, ke **dum Esperanto-aranĝoj la babilemaj samideanoj trovu unu la aliajn.**

La esenco de la ludo estas la sekva:

- Kiam komencanto ŝatus konversacii kun pli flue parolanta esperantisto, pinĉu sur sian veston **verdan** pinĉilon!
- Kiam pli sperta samideano helpemas al tiuj, kiuj ankoraŭ bezonas spertiĝi, pinĉu sur sin **ruĝan** pinĉilon!
- Ambaŭ forprenu la pinĉilojn, kiam ili ne havas tempon aŭ emon por la babilado.

Se vi venos al UK kaj ŝatas la ideon, bonvolu kunpreni la por vi konvenan pinĉilon.

Se vi deziras helpi en la disvastigo de la ludo, kunprenu ankaŭ pliajn pinĉilojn kaj metu ilin en unu el la pinĉiluloj de la kongresejo.

Ni serĉas ankaŭ financajn subtenantojn kaj surlokajn helpantojn. Anoncu vin ĉe "redaktanto@edukado.net".

Pliajn informojn kaj bildojn bv. vidi en la sekcio "Aktualaĵoj" ĉe <http://www.edukado.net>

Ni esperas, ke la "*pinĉilumado*" fariĝos tradicio en la Esperanto-aranĝoj :-)

Kopiu ĝin kuraĝe kaj raportu pri viaj spertoj!

Ĉu vi jam aŭdis parolon en aliaj famaj planlingvoj?



Nun vi povas aŭskulti kaj kompari la lingvojn *Esperanto*, *Volapük*, *Ido*, *Occidental*, *Interlingua*, ĉar la saman 2-frazan fragmenton laŭtlegas Andreas Künzli, la aŭtoro de la *Svisa Enciklopedio*.

Adreso de la retejo: <http://14199.com/f686e4>



Unu el la plej legataj en Rusio semajna gazeto "*Argumenty i Fakty*" (Argumentoj kaj Faktoj) ekde majo regule publikigas vojaĝimpresojn de *Sergej Ĉikaĉev*, rusia petveturanto, celanta senmone ĉirkaŭveturi la mondon.

Sergej jam rakontis al la legantoj pri la vojaĝado en Siberio, Mongolio kaj laste, la 14-an de junio, "AiF" publikigis liajn impresojn pri petveturado en Ĉinio. Interalie Sergej raportas, ke en Ŝanĥajo li tranoktis ĉe

esperantistoj kaj skize rakontas pri "*Pasporta servo*" - asertante, ke helpe de Esperanto « ...en Ĉinio estas pli facile ricevi subtenon ol per la angla lingvo ».

Nun estas publikigataj rememoroj pri jam okazinta parto de la vojaĝado. Sergej startis de sia urbo *Magadan* en aŭgusto 2004 (laŭ "AiF-online - kaj en aŭgusto 2003 laŭ pluraj E-gazetoj. Eble temas pri vojaĝado kun fojaj Interrompoj) kaj nun troviĝas en Indonezio kaj de tie planas iri al Aŭstralio. La vojaĝado daŭros ankoraŭ 3-4 jarojn.

La aperintaj artikoloj:

http://www.aif.ru/articles/article_prmid_dta55741.html (pri Ĉinio)

http://www.aif.ru/articles/article_prmid_dta54012.html (pri Mongolio)

http://www.aif.ru/articles/article_prmid_dta51910.html (pri Siberio)

Amike,

Andrej Grigorjevskij - el [e-rus-info]

Interkultura Centro Herzberg (ICH), DE-37412 Herzberg, 28.07.2007

Kara leganto,

1) jen denove pozitiva novaĵo el **Herzberg - la Esperanto-urbo**. Ĉu oni eĉ kreos Esperanto-regionon (ekz. LEADER-regionon)? Nekredeble, sed vera informo:

Je la 27a de julio 2007 *Peter Zilvar* (GEA-filio), *Marika Frense* (EGS) kaj *Zsófia Koródy* (AGEI) partoprenis projekt-foiron en la najbara urbo *Osterode*. I.a. pro la unika agnosko: Herzberg - la Esperanto-urbo, GEA-filio por kulturo kaj klerigado en Herzberg, oficialaj kontaktoj per Esperanto al nia pola ĝemelurbo, ktp. la bonŝancoj por "modela Esperanto-regiono" vere realas, eble jam en 2008 ni povos ricevi subtenojn. Cetere estis vere longa kaj kontinua preparvojo.

Ministro *Ehlen* el Hanovro, deputino s-ino *Seeringer* (baldaŭ ŝi vizitosnian Germanan Esperanto-Centron en Herzberg), subdistriktestro *Bernd Reuter*) donas verdan lumon por la plua multfaceta progreso de Esperanto en la reala vivanta medio. Esperanto havos prioritaton, ĉar ni estas en la plej alta poent-kategorio.

2) Por la gimnazio en Herzberg ni jam peris sukcesajn kontaktojn al gimnazio en *Budapeŝto*, al nia ĝemelurbo en *Gora* kaj nun pro klasvizitoj ankaŭ al gimnazio en *Nov-Brunsvigo* en Kanado (danke al samideano *Kodjo*, kiu vizitis s-ron *Böthel*, la estron de la gimnazio en Herzberg. La direktoroj vere ĝojis kaj laŭdas Esperanton, nun ili/ni serĉas kontaktojn al gimnazio en Italio.

Peter Zilvar, Zsófia Kóródy kaj aliaj

P.S. Kiam vi vizitos vian Esperanton-urbon?

fonto: Ret-info: <http://www.eventoj.hu>

... *Saluton kara amiko Pol!*



Mi estas Joe,

*Mi antaŭdankas vian afablan helpon kaj mi esperas, ke vi povos denove ĉifoje nin helpi disvastigi nian novan laboron, **La Patro**.*

Ĝi estas 40 minuta filmo, bazita sur japana literaturo el 1906, kies originalo estis farita por teatro; ni adaptiĝis al filmo.


Temas pri drama familio, kies patro forlasis la edzinon kun tri infanetoj, kaj post 20 jaroj volas repreni la familianojn sed io mistera okazas en tiu reveno. Nur en la lasta sceno vi sukcesos kompreni la tutan filmon.

Brakumojn el Brazilo

Amike,

Joe & Karen

www.imagu.com.br



En la DVD vi trovos diversajn subtekstojn... *malantaŭ la scenojn... intervjuojn...* Kiam la pasintaj eraroj starigas malbonajn sentojn... Ĉu vi sukcesus pardoni? Larmoj, ĝojo, kontraŭaj sentoj, en la suferigita familio Montenegro. Ĉio povas okazi en via propra familio !...

1 DVD kostas 22 eŭroj

(se perantoj aperus, ili povas akiri rabatojn.)

Hejmpaĝo: www.imagu.com.br mendo@imagu.com.br (por mendoj)

... vi ŝatis la DVD "*Gerda malaperis*"?...
vi tutsame frandos la novan samstipan eldonaĵon "*la patro*"

promocii junajn filmistojn estas ankaŭ riĉigi nian esperanto-kulturon



skoltismo  kaj esperanto

Antaŭ kelke da tempo nia amiko Jean-Louis Texier atentigis nin pri la "kreo" de la skolta movado sub la impulso de Baden-Powell... antaŭ 50 jaroj.



Kiam vi vizitis -aŭ vizitos se ne ankoraŭ farite- la nacian muzeon de esperanto en Gray, kiu meritas ja vian alvenon, certe okulfrapis aŭ -frapos vin, granda horizontala foto kaptita en "*Les Arènes de Lutèce*", okaze de la 35a UKo en Parizo, 2325 aliĝintoj en... 1950 ! Eble surprizis (-zos...) vin malkovro de du enpartoprenintoj, skolte vestitaj. Jen raraĵo, ĉu ne !... Temis pri J.-L. T. kaj pri la redaktoro de nia bulteno !

Fakte, ŝovo de la internacia lingvo en la "skoltismon" ne facilis, kaj daŭre ne facilas ankoraŭ pli hodiaŭ pro la neevitebla invado de la angla idiomo. Tamen kuraĝuloj ne hezitas informi tiun medion pri la nekompareblaj plusoj, kiuj posedus skoltoj lernante esperanton. Vi legos aliloke la iniciativon de nia nelacigebla amiko *Claude Jourde* en St-Dizier (52).

Aldonu al via jara vizit-programo halton en la vilaĝo *Thorey-Lyautey* (54115) por dediĉi iom da tempo ne nur al la vizito de la "muzeo Lyautey" sed ankaŭ al la franca fak-muzeo de la skoltismo ankaŭ lokigita en la kastelo de la marŝalo, kiu estis honor-prezidanto de la franca skoltismo. Pli ol 1000 memoraĵoj divers-specaj sub viaj okuloj...

La "*Skolta Esperanto-Ligo*" -tutmonda asocio- pluvivas kaj eldonas intereso-plenan bultenon, "*La Skolta Mondo*", kiu aperas ankaŭ perrete.

Inter la ĵusaj fak-eventoj ni menciuj la polan nacian jamboreon en *Kielce* en aŭgusto kun programo en esperanto ; dum 12 duhoraj aranĝoj 240 geknaboj kantis kaj ludis en esperanto.

Responsas en Francio samuel.garland@ac-clermont.fr

... el "La Ondo de Esperanto" ...

La kvara libro pri komisaro Maigret en Esperanto

Fine de aŭgusto, *Sezonoj (Kaliningrado, Ruslando)* aperigis la libron "La flava hundo" de Georges Simenon en la traduko de Daniel Luez.



Entute, oni eldonis pli ol 500 milionojn da ekzempleroj de Simenonaj verkoj en kvardeko da lingvoj. En 1999, danke al Daniel Luez, al ĉi tiuj lingvoj finfine aldoniĝis ankaŭ Esperanto, per la romano *Maigret hezitas*, verkita en 1968. La sukceso de ĉi tiu romano (la tuta stoko jam plene elĉerpiĝis) instigis la tradukanton kaj *Sezonojn* aperigi pliajn librojn pri Maigret en la internacia lingvo.

En *Maigret kaj la maljuna damo* (1949), kies Esperanta traduko aperis en 2002, la komisaro forlasas Parizon kaj veturas al provinco por esplori komplikan kazon de servistino Roza (eĉ, *la Roza*), kiu supozeble mortis anstataŭ sia mastrino.

Dum tridek kvin jaroj komisaro Maigret renkontis neniun el siaj samklasanoj, kaj jen al lia oficejo venis lia kunlerninto *Leono Florentin*, kiun la komisaro traktas profesie en *Amiko el la junaĝo* (france 1968, Esperante 2004).

La flava hundo estas unu el la plej fruaj romanoj pri Maigret. Ĝi estis eldonita en 1931, kaj jam sekvajare ĝia filmoversio kun *Abel Tarride* en la rolo de Maigret, estis spektebla sur ekranoj de kinejoj (aliaj filmaj versioj diverslingvaj aperis poste). La eventoj disvolviĝas en *Concarneau*, kie ĝis nun funkcias la restoracio *Admiralo (L'Amiral)*.

Kelkaj realaĵoj, menciitaj en la romano, eble ne estas facile kompreneblaj por nuntempuloj, precipe por ne francoj. Ili estas asteriskitaj kaj klarigitaj en *Notoj*. Estas aldonita ankaŭ proksimuma prononco de kelkaj francaj nomoj, renkontataj en la romano. La libro estas presita en *Kaŭno (Litovio)*. La kovrilon faris *Larisa Jakovleva*.

"*La flava hundo*" estas mendebla kontraŭ 12 eŭroj ĉe pluraj libroservoj, al kiuj la eldonejo jam sendis la librojn.

En nia retejo estas legeblaj la [Antaŭparolo](#) (de Aleksander Korĵenkov) kaj [la unua ĉapitro](#).

Agrablan legadon!



La franca aktoro *Bruno Cremer*, kiu nuntempe ludas la rolon de Maigret sur la televid-ekranoj.



Fontenoy-la-JouÛte
Village du livre



Kerno de la Nancy-a grupo sub la gvido de Jacques HERLE plurfoje deĵoris ankaŭ ĉi-somere en la vilaĝo de la libroj, *Fontenoy-la-Joute* (54), kun la helpo de diversaj samideanoj de la pli-malpli proksima regiono.

Jen grupiĝo de scivolemuloj, kiuj sekvis la demonstrojn de Sinjorino Gisèle BERTAPELLE, uzanta la pedagogian materialon fabrikitan de nia eksa prezidanto kaj respondeculo de la Libroservo, sinjoro Jean-Luc THIBIAS. Montriĝis, ke rendezuas en tiu vilaĝo homoj malfermaj al kulturaj informoj. Espereble ni baldaŭ povos trovi ilin en niaj kursoj kaj staĝoj.

E. Ludwig

(fotisto : F.X. GILBERT)



El nia libroservo

Informoj



⇒ **La libroservo partoprenos la 61 an regionan staĝon de esperanto en Saales la 19/21 aĵn de oktobro 2007** Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu gxin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŬEVRE libroservo.efe@wanadoo.fr)




Nove alvenintaj libroj




1) **Kronikoj el mia tirkesto**, miksita literaturo, 128 p, **Riviĕre**, *Memeldono*. 11,00 €. .Noveletoj, poemoj memorajoj .

2) **Bruna mateno**.

Novelo, 12 p, **Pavloff**, *Riviĕre*, 2,00 €. Ĉu akcepti la brunigon de la katoj ?



Por mendi librojn:



- .1 Vi sendas vian mendon
 - per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŬEVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
 - per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

x.....

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-

S-ro/ino
-
-
-

En

la


Subskribo:

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2008 ĝis 2010

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2007, pagi vian abonon al **La Informilo** kaj vian membro-kotizon por nia asocio.

Jaroj:	2008	2009	2010
Abono por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menciigi la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2008 por 1027		
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2008, 2009 ktp. Se necese menciigu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.		
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciigu la celon de via pago)		
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menciigi la celon de via pago kaj vian adreskodon)		
Vi povas sam-okaze mendi jenajn librojn jam menciitajn en la antaŭa numero 138	Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo Kolekto de rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio		26 eŭroj
	Poŝamiko: Tre plaĉa poŝ-forma kajereto kun multaj koloraj ilustraĵoj pri gramatiko, bildvortaroj kaj kelkaj ekzercoj.		6,50 eŭroj

... ankaŭ sur nia librobreto ! ...



« ... Mi ĵus preterpasis kelkajn stakojn da nove alvenintaj libroj en la UEA-Libroservo - tute kutima okazaĵo, tamen mi estis aparte kaptita de tiuj ĉi, kaj haltis momente por rigardi.

"**La mastro de l' ringoj**", mi legis. "Ĝi estis elĉerpita, kaj nun iu reeldonis ĝin?" mi konfirmpetis de Ionel Onet, kiu sidis ĉe sia normala laborloko. Li respondis ke jes, kaj mi plu rigardis. Temis pri ne unu sed ĉiuj tri volumoj de tiu verko, kunigitaj de larĝa, egale bele presita kartona rubando.

Tio ĉi ne estas nur la plej Esperanta eldonaĵo kiun mi estas de longa tempo vidinta, ĝi estas unu el la plej belaj aferoj, kiujn mi ie/iam ajn vidis. Iom ŝokite, mi demandis al Ionel, "Kiu faris tion?" Mia unua suspektato estis *Petro Ĉrdle*, pro la kovrila beleco - sed ne, Ionel diris, "*Korĵenkov*" Gratulegon do al li.

Mi evidente ne estas senvorta, sed vortoj tamen ne komunikas **la impresegan kvaliton de tiu ĉi eldonaĵo**. Ĝi haltigas spiradon ».

Roy McCoy



Tri inĝenieroj *Apple* kaj 3 inĝenieroj *Microsoft* trafas sin sur kajo de stacidomo cele ĉeeston de grava konferenco pri informadiko. La homoj de *Microsoft* aĉetas 3 biletojn kaj mirigite konstatas, ke iliaj kolegoj havigas al si nur unu bileton... por la tri. Je klarigopeto de la homoj *Apple*, ili simple kontentiĝas ekridi, aldonante: "Nu, atendu kaj vidu!"



Survoje, kontrolisto eniras la vagonon, la tri inĝenieroj *Microsoft* forlasas la kupeon kaj rapidas al la necesejo, en kiu ili enfermiĝas. Denove mirigitaj, la tri homoj *Apple* prezentas la tri biletojn kaj iom poste aŭdas la kontroliston, kiu frapas ĉe la pordo de la necesejo... "Bilet-kontrolon!". Voĉo respondas: "Jen!..." kaj bileto aperas sub la pordon; la kontrolisto okulumas al ĝi kaj diras... "En ordo!"

Tiu tekniko ege impresas la tri inĝenierojn *Apple*...

Revenvojaĝo. Ĉi-foje ili aĉetas nur unu bileton... dum la tri homoj *Microsoft* tute ne vizitas la vendo-giĉeton!... Ili kontentiĝas ekridi kaj aldonas: "Nur atendu kaj vidu!"

Kontrolisto eniras la vagonon... kaj la 3 inĝenieroj *Apple* rapidas al la necesejo, en kiu ili enfermiĝas. Antaŭ la alveno de la kontrolisto en la kupeon, la tri inĝenieroj de *Microsoft* iom malpli rapide ol siaj kolegoj sin direktas ankaŭ al la necesejo. Unu frapas al la pordo kaj avertas; "Kontrolon de la biletoj!"... Tuj aperas bileto sub la pordon, li kapas ĝin, dirante: "Dankon, en ordo!" kaj la tri impetas en la duan necesejon de la vagono!

Nu, kara leganto, ne tro emfazu pri la supereco de unu el la du firmaoj... kiu scias ?



« ... Nu, kia surprizo ! Ni ne revidis nin depost kiam ni forlasis universitaton, alparolas Roberto sian amikon Petro. Mi memoras, ke tiam, vi volis aniri Usonon por enkasigi unu milionon da dolaroj ĝis kiam vi estus tridek jaraĝa ...

- Prave, mi plenumis la duonon de mia intenco !
- Ĉu vi ja gajnis kvincent mil dolarojn ?
- Ne ... mi ĵus atingis mian tridekan jaron ! ».

Iu virino eniras drog-butikon kaj petas arsenikon, veneno kutime uzata en miksaĵo por mortigi diversajn nocajn bestetojn...

La vendisto informiĝas :

- « Jes, sinjorino, kian kvanton ?
- Nu, por unu Neee, por du personoj mi petas... ».

« Mi ne komprenas, rakontas iu turisto... Kiam mi feritempis en Aŭstralio, mi aĉetis bumerangon... Ĉar la ilo ne bone funkciis, mi plendis perletere al la tiea vendisto por peti repagon !

- Ĉu li konsentis ?
- Mia letero revenis al mi ! ».

En elementa lernejo, la instruistino proponas al la infanoj sugesti profesion, kiun ili elektus onte.

Iu knabo desegnis aviadilon, li ja deziras stiri tian aparaton; alia pentris belan ŝipon, li deziras iĝi sumara komandanto. Nur unu sola knabo donis tute blankan folion...

- « Kial ci nenion desegnis ?
- Nu, S' ino, mi volas edziĝi kaj ricevi infanojn...
- Bone, sed kial tiu virga folio ?
- Ĉu vere vi postulas desegnaĵon pri tio ? ».

En la kuirejo, la edzino preparas omleton... Dume alproksimiĝas la edzo : « Atentu, aldonu ankaŭ iom da butero... Ne, ne tiom da ! Ŝajnas ke estas tro da varmo sub la pato... Nun, inversigu la omleton ! Vidu, ĝi tro kuiris sur unu flanko ! Realdonu iom da butero por finkuir !... Rapidu, forigu ĉion, brulodoras !...

- Sed, karulo, kio okazas ? Ĉu vi freneziĝas ? Mi ja scias ellabori omleton!
- Jes ja... Mi tutsimple deziras elvoki vian sintenon, kiam survoje mi sidas ĉe la stirilo ! ».

En libro-vendejo... « Mi perpleksiĝas, infor mas klientino, mi okulumas al du policromanoj de Agatha Christie...

Kvankam ambaŭ eenhavas la saman nombron da paĝoj, unu kostas 6,5 eŭrojn kaj la alia 12 !


- Prave ! En la unua temas nur pri du murdoj, en la dua pri kvar ! ».

« Johaneto, ĉu ci bone amuziĝis ? petas la patrino, kiu revenas hejmen post la labortago...

- Jes mama, mi ludis leterportiston !
- Klarigu al mi !
- Mi ŝovis leteron en ĉiun skatolon de la domoj de nia kvartalo...
- Neatendite, ja... Sed kie ci malkovris tiujn leterojn ?
- En tirkesto de cia lit-tableto... Ĉirkaŭis ilin rozkolora rubando ! ».

Je fino de konkurso de leterkolomboj, la kontrolisto avertas : « Ĉiuj kolomboj de S-ro Alberto estis narkitaj !


- Kiel vi povas certigi tion ?
- pridemandas la organizanto.
- Anonima ŝlipeto alkroĉita je piedo de birdo rivelas tion...
- Eble temas pri jaluza kolombo !
- Tute ne, temas pri korvo ! »



Sincere dirite, ĉu vi ridetis?



bof!



DISTRANĜULO



Mistera krado

Literojn de la krado 1 vi ŝovu en la kradon 2, kolumno post kolumno. Vi povos legi poste humuraĵon de Alphonse ALLAIS.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	N	E	I	N	M	K	I	F	A	A	I	I
2	P	Ĝ	O	P	O	M	K	G	A	R	T	U
3	T	I	O	S	R	O	O	O	A	S	V	
4		O	S	T		O	R	R	G	Ŭ	Ŭ	
5		P		V		S		R		N		

Solvoj de la lastaj enigmoj (138)

Vertikala enigmo: *Mono helpas elteni malriĉecon*

Stvbrnz: *Ekzistas virinoj, kiuj ne ŝatas suferigi plurajn virojn samtempe, kiuj preferas dediĉi sin nur al unu sola; temas pri virinoj fidelaj.*

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												



La loĝantoj de Taŝkent tre fieras pri sia metroo... sed estas strikte malpermesite kapti iun ajn foton aŭ ankoraŭ pli "danĝere" muzikumi en la koridoroj, eĉ se temas pri kaŝita "almozpeto".

Iu giganta policisto alprokimiĝas je iu viro, kiu ludas akordionon...

"Hej! Ĉu vi havas legitimilon por funkciigi vian muzikilon ĉi-tie?"

- Hem... ne, sinjoro policisto !
- Bone, akompanu min, mi petas !
- Bonvoleme, sinjoro policisto, kion vi deziras kanti? "

Vertikala enigmo

Helpe de la ĉi-subaj vorteroj alfabete ordigitaj, malkovru la 23 vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos asertaĵon de Izaak Newton.

ak ak an ar be bo bo bri ĉi da di du eo eo eza han iso ito jas ji jo ki klo ko ku lik lo lo lu me mi mo naf ni no no nus ob oko on opi opi ov po po ra ro rui sa su to to tra tro ul umi uv

- | | | |
|----|-----------------|--------------------------------|
| 1 | + - - + - - - | faciligi la glitadon |
| 2 | + - - + - - | rolludanto en filmo |
| 3 | + - - + - | ĉina urbo |
| 4 | + - - + - - - | antikva, fortigita loko |
| 5 | + - - + - - - - | litertipo |
| 6 | + - - + - | ellasi ovon |
| 7 | + - - + - | petro uzita en juvelarto |
| 8 | + - - + - - | duonsfera tegmento |
| 9 | + - - + - - | maniero pensi aŭ juĝi |
| 10 | + - - + - | natura oleo |
| 11 | + - - + | sevo el frukto |
| 12 | + - - + - | ruinigita urbo en Malgrandazio |
| 13 | + - - + - | restaĵo post disfalo |
| 14 | + - - + | vaskula membrano de la okulo |
| 15 | + - - + - - | artropodo teksanta reton |
| 16 | + - - + - - - - | malgranda krustaco |
| 17 | + - - + - | elemento de ĉarpentaĵo |
| 18 | + - - + - - | kultestro de juda komunumo |
| 19 | + - - + - | dika |
| 20 | + - - + - - | malmodere manĝi, trinki, amori |
| 21 | + - - + - - - | tre venena herbo |
| 22 | + - - + - - | honoriga disketo |
| 23 | + - - + - | vegetaĵo por veneni sagon |



"Kiom aĝa vi estas ?..."

Ĉiu el ni foje malfacile konsentas riveii sian aĝon.... -ne decas peti tion de virino!-... Nu, asertu al iu ajn, ke vi malkovros ĝian aĝon...!

Starigu simple tiujn demandojn...

- 1/ - Bonvolu mi petas, inversigi la 4 lastajn ciferojn de via telefon-numero...
 - 2/ - Subtrahu (deprenu) la plej malgrandan nombron de la alia...
(ne demandu la respondon !)
 - 3/ - Bonvolu poste adicii (sumigi) ĉiujn ciferojn de la trovita nombro, kaj denove, tiujn de la noveltrovita nombro... ĝis kiam restos nur unu cifero...
(ne demandu la respondon !)
 - 4/ - Bonvolu subtrahi tiun ciferon el la du lastaj ciferoj de via naskiĝjaro...
(petu respondon... Vi nun kapablas doni la aĝon de la pridemandita persono !).
- Sekreto: adicii la ciferon 9 al la laste donita nombro, vi ricevos la du lastajn ciferojn de la naskiĝjaro, do ankaŭ la aktualan aĝon... La lasta cifero donita je la demandoj de 1 ĝis 3 estas ja ĉiam 9...).



ni malstreĉigu la estraron !



memore al la TEJO-kongreso en Vjetnamio



nur antaŭ la impresa hotelo "Kosmos" li devis stari !



el la "Rusiaj Tagoj"... ni retrovu la perditajn kantojn !